# *Ratifas la kuba prezidento ke Venezuelo ?iam povos kalkuli je Kubo*





**Foto:@PresidenciaCuba**

Havano,  maj 16 (RHK) La unua sekretario de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Kubo kaj prezidento de la Respubliko, Miguel Díaz-Canel, akceptis ?i-merkredon posttagmeze, en la Palaco de la Revolucio, la kancelieron de Venezuelo, Yvan Gil. , kiu  oficiale vizitas  la Insulo.

Dum la kunveno, la ?tatestro sendis korinklinan saluton al sia ekvivalento Nicolás Maduro Moros, raportis la Prezidanteco en X.

Díaz-Canel emfazis la gravecon de la ?eesto de Gil en la kariba nacio, kaj gratulis Venezuelon pro la sukcesa okazigo de la lasta Pintkunveno ALBA-TCP, kiun li priskribis kiel solida.
"Venezuelo ?iam povos kalkuli je Kubo por la  kunlaboro, kiun ili bezonas", diris la prezidento poste.

Siaflanke, la venezuela ministro pri eksteraj aferoj dankis Kubon pro ?ia tuta subteno, kaj transdonis saluton de korinklino kaj solidareco de prezidento Maduro.

Krome, li parolis pri gravaj komunaj defioj por venki, en aktualaj kaj longtempaj situacioj.

?i-merkredon, Gil anka? inter?an?is kun sia ekvivalento Bruno Rodríguez, dialogon en kiu ili pledis plifortigi la nunajn duflankajn ligojn, kaj pligrandigi kunlaborajn interkonsentojn en la areo de sano, edukado, scienco kaj teknologio por pli granda ekonomia kaj produktiva profito de amba? popoloj.

Fonto: ACN

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/354852-ratifas-la-kuba-prezidento-ke-venezuelo-ciam-povos-kalkuli-je-kubo

Radio Habana Cuba